# LA INFORMILO

Bulteno de la Orient-franca Federacio aliĝinta al Unuiĝo Franca por Esperanto



Prezidanto : R. KUBLER - 20, Rue du Ruisseau - RODEREN - 68 - THANN (Ht-Rhin)

Sekretario : J.-P. COLNOT - 15, Rue de Lavaux - 54 - LAXOU (Mthe-et-Moselle)

Kasisto : J. CHAPELLIER - 43, Rue Palissot - 54 - NANCY - CCP.399-75 NANCY



Nº 55 - APRILO 1967


## 26-a Kongreso de la Orientfranca Esperanto-Federacio

Nia jara kongreso okazos la dimanĉon 30-an de aprilo 1967 en MULHOUSE (Haut-Rhin).

Adreso de la Kongreso : Restaurant du Jardin Zoologique
31, Avenue du 9º D.I.C. MULHOUSE

(La eniro en la kongreslokon troviĝas je la suda flanko de la zoologia ĝardeno - oni ne eniru en la ĝardeno mem).

Laborkunveno : je la 9-a horo precize (tagordo ĉi-sube).

Tagmanĝo : por la gesamideanoj, kiuj deziras komune tagmanĝi : je la 12a30, en la sama loko.

Menuo : Supo de l'tago
Koko je Riesling
Nudeloj je butero
Speciala glaciaĵo

Prezo : 12.- F. + 10 % servmono kaj trinkaĵo

Distraĵoj : Posttagmeze, oni povas viziti la famkonatan "Zoologian Ĝardenon" kaj ties belegan ĉirkaŭaĵon.
La ordinara enirprezo en la ĝardenon kostas 2.- F.
La partoprenantoj al la tagmanĝo eniros senpage.

Se malbela vetero, varia programo aŭ amika babilado laŭ ĉies kontribuo.

-*-*-*-*-*-

Ĉiuj ĉeestontoj bonvolu plenigi la ĉi-enmetitan aliĝilon kaj sendi ĝin kiel eble plej frue al :

Sinjoro Marcel Cuené - 26, Rue Engel-Dollfus - 68 - MULHOUSE

## TAGORDO DE LA KUNVENO

1 - Malfermo de la kunsido fare de nia prezidanto, S-ro KUBLER

2 - Salutleteroj ricevitaj (S-ro CUENE)

3 - Raportoj de la sekretario kaj de la kasisto pri la funkciado de la Federacio.

.../...

4 - Problemoj de nia Federacio :
- Vivo de la grupoj kaj izoluloj (raportoj de ĉiuj membroj estas petataj por kompletigi la ĝeneralan aktivecan raporton).
- Renovigo de triono de nia Komitato. Laŭ alfabeta ordo, la mandato de la 4 jenaj komitatanoj, elektitaj antaŭ 2 jaroj, finiĝas nun : S-roj COLNOT, CUENE, DENIS, DURAND. Tiuj 4 komitatanoj bonvolu anonci, ĉu ili rekandidatiĝos. Novaj kandidatoj povas anonci sin, prefere antaŭ la kongrestago.

5 - Rilatoj kun la nacia movado :
- studo de la jarraportoj de U.F.E.
- elekto de nia delegito al la Nacia Kongreso
- voĉdonoj, proponoj, rezolucioj, rilatantaj kun la Nacia Kongreso.

6 - Oficiala akcepto fare de la urbestro, je la 11a30 en la urbodomo.

7 - Post tagmanĝo : Diversaĵoj.

La oficiala akcepto en la urbdomo povante esti tre valora por nia movado en MULHOUSE, la raportoj kaj la diskutoj estos interrompitaj je la 11a. Se necese, la komitato kaj la interesuloj povos re-kunveni posttagmeze.

8 - Ekzameno por atesto pri elementa lernado (posttagmeze).

wnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwnwn

## RAPORTO PRI LA AKTIVECO DE LA FEDERACIO 1966-1967

Dum plia jaro, nia Federacio vivetis. Ĝi ne perdis multe, ankaŭ ĝi malmulte akiris . La stato de nia membraro estis la jena dum la pasintaj jaroj :

| | | | |
|---|---|---|---|
| 1962 : | 100 | 1965 : | 112 |
| 1963 : | 89 | 1966 : | 84 |
| 1964 : | 85 | | |

Je la dato 27.3.1967, por 1967 kotizis nur 67 personoj. Tridek membroj de la pasinta jaro ankoraŭ ne rekotizis, ni varbis 9 novulojn (je la 15.4.66, ni estis 70 kotizintoj).

Niaj grupoj : Ni resumu la informojn jam donitajn de la Informilo : Ekzistas oficiale nur unu grupo, en Strasbourg, kun pli ol 20 membroj (ekzakte 26 pasintjare) kaj regulaj oftaj kunvenoj. La junulara grupo en Thann (9 membroj) plifirmigas siajn bazojn antaŭ ol deklari sin oficiale. Krom tio, ekzistas eblecoj de grupoj en Epinal, Bar-le-Duc, Mulhouse, kaj ankaŭ en Nancy, kie estis lastjare 17 kotizantoj sed fakte neniu oficiala grupo.

Tre vigla estas la esperantista vivo en Bruyères, dank'al la kursoj de S-ro Claudel en la liceo, kaj en Guebwiller, kie S-ro Wermelinger tre efike laboras : naskiĝis tie la Kultura Centro "FLORIVAL", kiu jam konigis allogan laborprogramon. Ni esperu, ke el tiuj 2 urbetoj venos novaj fortoj al nia Federacio.

Informado pri Esperanto : Kiel jam dirite, en Guebwiller okazis tre efika propagando per paneloj en montrofenestroj de magazenoj. En Nancy, post intensa provo pasintjare (ekspozicieto, afiŝoj, 1600 flugfolioj, 6 gazetartikoloj... sen rezulto !) ni ne rekomencis tiajn klopodojn. Ni aperigis dum la antaŭa lernjaro 35 komunikojn en la loka gazetaro pri nia aktiveco, kaj 20 ĉi-jare. Pri nia koresponda kurso, ni dissendis pasintjare 78 komunikojn (certe aperis nur 17), kaj ĉi-jare nur 24 (aperis certe 7). Informado simila certe okazis en aliaj urboj (Strasbourg, Thann, k.t.p.) sed ni ne scias ion precizan pri tio.

.../...

Ni intencis starigi Federacian Informservon pri Esperanto. Sed taŭgaj artikoloj mankas (la Informa Fako de U.F.E. ne plu povas ilin liveri nun), la alvoko en la Informilo por peti helpon de niaj membroj por redaktado de tiuj komunikoj restis sen eĥo... kaj tempo mankas al la respondeculo : estas ja malfacile prizorgi samtempe grupan vivon, kursojn kaj federacian servon.

La projekto tamen ne estas mortinta, la elektitaj departementaj respondeculoj estas nun kontaktataj letere unu post la alia. Se troviĝos sufiĉe da helpemuloj inter niaj membroj, la servo povus tre baldaŭ funkcii.

Instruado de Esperanto : Parolaj kursoj sukcese funkciis en Bruyères, Strasbourg, Thann, Guebwiller, Mulhouse. Ili fiaskis kiel kutime en Nancy. Pri aliaj kursoj ni ne estas informitaj.

Korespondа kurso funkcias de 16 jaroj en Nancy, sed ĝi malfacile varbas lernantojn : 7 dum la pasinta lernjaro, 5 ĉi-jare.

Varbado de membroj : La sama eta sed konstanta varbado okazas en Strasbourg. Krom tio, stagnado. La nancia koresponda kurso varbis ĉi-jare siajn 5 membrojn... en Alzaco !

Delegitaro de U.E.A. : Mankas fakdelegitoj pri instruado, turismo kaj S.O.S. aŭtomobila servo, ĉefe en Strasbourg-Mulhouse. S-ro Kubler fariĝis D kaj JD en Thann (anstataŭ Roderen), S-ro Grossmann D kaj JD en Vieux-Thann, S-ro Claudel FD en Bruyères (povus estis ankaŭ D). En Boulay povus esti D kaj FD. Personoj kiuj deziras farigi Delegito, Fakdelegito aŭ Junular-Delegito bonvolu mendi la necesajn respondilojn al la federacia sekretario.

Nia bulteno : La Informilo aperis nur 2 foje ĉijare. Mankis tempo, mankis informoj, mankis helpemuloj por pli oftaj numeroj. La n° 53 estis eldonita dank'al la sindonemo de nia Prezidanto, la n° 54 kaj la nuna 55 dank'al la sindonemo de F-ino Prud'homme kaj de S-ro Chapellier. Dankon kaj gratulojn al ili.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

NIA VIVO EN .......

... Nancy - Kunvenoj okazis regule de la pasinta jaro ĝis februaro, sed nur unufoje monate la duan mardon de l'monato. Ĉiufoje ĉeestis 3 ĝis 10 gesamideanoj.

Ni provas aktuale revigligi la Esperanto-aktivecon per diversaj rimedoj. Ĉar pli post pli la Centra Junuldomo (kiu posedas nun 1500 membrojn - neesperantistojn ... kaj nur 3 esperantistajn membrojn! ...) estas la sidejo de nia aktiveco, ni unue firmigis la situacion de la esperanto-sekcio de la Junuldomo : partopreno al la administrado de la Domo, reprezentado ĉe la ĉiumorataj kunvenoj de la "domkonsilio", kie reprezentantoj de ĉiuj aktivecoj pridiskutas organizajn problemojn. Tio jam ŝanĝis la etoson en la Domo, oni pli favore konsideras nin en la junula medio mem (la direkcio ĉiam estis favora, sed ne la junuloj !).

Ni provis anonci 2 informkunvenojn pri Esperanto, sed ili estis tro fruaj kaj tute fiaskis : nur 2 personoj venis por informiĝi, parola kurso ĝis nun ne povis funkciis. Krome, oni ĵus starigis (luksan !) bibliotekon en la Junuldomo, kie oni rezervigis por Esperanto 2 bretojn. Ni devis do reorganizi tie la plej belaspektajn librojn de nia biblioteko, kaj la ceterajn librojn kaj broŝurojn ni devis loki ĉe privatulojn.

.../...

De post marto, per gazetartikoloj kaj afiŝado, ni konstante anoncas : "por lerni, por praktiki Esperanton, konstanta Esperanto-Aktiveco ĉiuĵaŭde ek de la 20a15 en la Junuldomo".

Sub la ŝildo "Nancy-Esperanto", komuna kunveno kun membroj de la eks-Nancia Grupo okazas nun la 2an ĵaŭdon de l'monato. Pliboniga kurso okazas regule, ankaŭ la 2an kaj la 4an ĵaŭdojn. Dum la aliaj ĵaŭdoj, miksiĝas laŭ ĉiusemajnaj decidoj kaj cirkonstancoj : informado pri Esperanto, inica aŭ pliboniga kurso, kantado, konversacio, k.t.p. Por liberaj samideanoj, la aktiveco povus eĉ komenciĝi pli frue en la vespero kun vespermanĝo en la restoracio de la Junuldomo (prezo 3,60 por membroj). La Junuldomo krome disponas pri feriadomo en La Bresse (Vosges), kie estus eble aranĝi renkontiĝojn.

... Guebwiller (Ht-Rhin) - La 1an de januaro naskiĝis la asocio "Kultura Esperanto-Centro FLORIVAL". Nia asocio intencas verki dokumentaron sub la formo de diapozitivoj kun akompana sonbendo (9,5 cm./sek.). Ni planas eldoni 60 ĝis 90 bildojn kaj 90 minutan klarigon parolatan, kiu prezentos unue nian interesan urbeton Guebwiller, kaj due ties agrablan ĉirkaŭaĵon : montaro Vogezoj kaj famaj vitejoj. Ĝi informos vin pri la allogaj turismaj eblecoj, la viv-maniero de la enloĝantoj kaj ties aktivecoj (ĉefe tolaĵ- kaj mekanikindustrio) kaj ankaŭ pri la agado de nia juna esperplena Esperanto-Asocio.

Se vi deziras prunte ricevi, senpage, la serion da diapozitivoj kaj la sonbendon post ties apero-verŝajne en la venonta somero- bonvolu senprokraste skribi <u>du</u> leterojn aŭ poŝtkartojn :

- unuan al Sinjoro Urbestro de Guebwiller
  Mairie de Guebwiller - <u>F - 68 GUEBWILLER</u> (Francujo)

- duan al la iniciatinto : Sinjoro Eugène Wermelinger
  66, Rue Florival - <u>F - 68 BUHL</u> (Francujo)

menciante vian deziron ricevi la eldonotaĵon, vian precizan adreson kaj eventuale informpetojn de via asocio aŭ grupo.

Bonvolu informi viajn korespondantojn el la tuta mondo pri nia iniciato, por ke multaj demandoj venu al Guebwiller. Se la nombro estos sufiĉe granda, ni povos eldoni la dokumentaron en pluraj ekzempleroj, tiele pli kaj pli da gesamideanoj ĝuos nian verkaĵon. Per Esperanto, ni konigos Guebwiller (prononcu gebviler) al la eksterlandanoj kaj samtempe ni helpos disvastigi la Esperanto-movadon.

xcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxcxc

## La vorto de la prezidanto

28-an de Marto.

<u>Pri junularaj aferoj</u> : mi ĵus forlasis la nacian kongresan renkontiĝon de JEFO, en la kastelo de Grezijono.

Tie mi trapasis agrablajn horojn, en junulara kaj amika etoso, kaj same faris Jeanne-Marie Erny el Buhl, André Grossmann el Vieux-Thann kaj Gérard Kohlmann el Thann.

Dum ni amuziĝis, promenadis kaj, fakte, laboris, ni ankaŭ, en la kulturdomo de la franclandanoj, priparolis nian venontan agadon en Francujo.

Fakte, sur la tereno de nia federacio, eblas agi en tiun sencon, kaj mi proponos, ĉe nia venonta kongreso en Mulhouse, la kreadon de junulara fako.

.../...

.../... (La vorto de la prezidanto)

Mi ŝatus, ke iu pli aĝa ol mi, surprenu la prezidantecon de nia organizo kaj dediĉu sian liberan tempon al antaŭenpuŝo de la movado.

Mi mem, ĉar nun mi aktivas en la estraro de JEFO kun gejunuloj tre agemaj kaj ege simpatiaj, ŝatus prizorgi pli bone la junularan flankon de nia afero kaj krei pli oftajn, eĉ novajn, kontaktojn inter la plej junaj federacianoj.

Pri la federacia kongreso : ne forgesu nian federacian kongreson en Mulhouse.

La tiea grupo, sub la gvido de S-ro Cuené, kaj la tuta estraro, kore invitas vin partopreni.

La loko kaj la programo certe plaĉos al vi !

Nepre rezervigu la dimanĉon, 30-an de aprilo.

R. KUBLER.

---

## E K S K U R S O J

Esperanto-Strasbourg organizos renkontiĝon dimanĉon 28-an de majo en La Hingrie apud Rombach-le-Franc (Stacidomo de Lièpvre).

LIEPVRE troviĝas sur la N. 59 (St-Dié - Sélestat). De tie oni iras al Rombach-le-Franc laŭ la D. 48, kaj el tiu vilaĝo al LA HINGRIE lasante dekstren la D.48 La kunvenejo estos en "Colonies de vacances de l'Union des Femmes Françaises". Tie troviĝas 60 litoj en diversaj dormoĉambroj, manĝejon, kuirejon, k.t.p. Oni povas do veni ek de sabato 27/5 por tranokti ; samideanoj akceptos vin de post la 16-a horo.

Vi kunportu nur trinkaĵon kaj manĝaĵon : en la domego estas teleroj kaj ĉiuj utilaĵoj por la tablo, dormsakoj kaj kovriloj.

Oni povos organizi por interesatoj viziton al Kastelo "Haut-Koenigsbourg" kaj promenadojn en la ĉirkaŭaĵo.

Se vi deziras veni trajne, anoncu vin al la suba adreso kaj aŭtomobiloj atendos vin en la stacidomo de Lièpvre.

Organizanto : Sinjoro Fernand KNECHT - Service Météorologique -
67 - ENTZHEIM (Bas-Rhin)

°°°°°°°°°°°°°°°

## P r o j e k t o j

- Renkontiĝo nur junulara estas organizata en Bruyères por la 9-a de aprilo inter la junularaj grupoj de Thann, Guebwiller kaj Bruyères.
- Internacia renkontiĝo en Thann-Guebwiller : Jam de nun la grupoj de Guebwiller kaj Thann, sub la gvido respektive de S-anoj Eugène Wermelinger kaj André Grossmann, okupiĝas pri la internacia renkontiĝo, kiu okazos la 2-an kaj 3-an de septembro. Pliajn informojn pri tiu grava aranĝo disdonos la "Informilo" en sia venonta numero.
- Krome ni proponas la jenajn ekskursojn :

Al Haut Barr, super Saverne. De tie oni povus piede ekskursi al Brotschberg kaj 2 Geroldseck (marŝado ĉirkaŭ 4 horojn).

Al la Bresse, Supervallée, Châlet de la Maison des Jeunes et de la Culture de Nancy.

.../...

.../...

Al kampadejo en la regiono Bains-les-Bains - St-Loup-sur-Semouse kie renkontiĝo estus ebla kun samideanoj el Franche-Comté.
Tiu renkontiĝo okazus ĉe la tendumejo "Camping des 3-Fontaines" en Le Lyaumont apud Aillevillers, survoje N.64 inter Bains-les-Bains kaj St-Loup-sur-Semouse. Tendumantoj povus veni sabate-dimanĉe, sed ne estas ebleco tranokti por personoj sen tendoj.

Ni proponas por tiuj ekskursoj la jenajn datojn : 4/6 - 18/6 - 2/7 - 10 au 16/9. Se malbela vetero, malfruigo al la posta dimanĉo laŭ letera interkonsento. Oni anoncu sian intereson por loko(j) kaj dato(j), oni eĉ povas proponi pliajn aŭ aliajn datojn kaj lokojn al la respondeculo, kiu centrigos la diversajn dezirojn kaj interesojn :

J.P. COLNOT 15, Rue de Lavaux - 54 - LAXOU.

Ĉiu interesiĝanto ricevos pli detalajn informojn per letero aŭ cirkulero. Do nepre anoncu vian intereson por ricevi tiujn informojn.

*******************************************************************************

Deziras korespondi :

- S-ro JAROSLAV SMEJKAL
  Sokolovskà 899/234 - PRAHA (8) (Ĉeĥoslovakio).

juna teknika oficisto, interesiĝas pri lingvoj (germana, angla), ludas gitaron, interesiĝas pri fotografado, vagado en naturo, deziras interŝanĝi amikajn leterojn, rememoraĵojn kaj diskojn.

- S-ro MOTYKIEWICZ JANUSZ
  BABIMOST ul. Poznanska 15/2 Woj. Ziel. Góra (Pollando).

23 jara edzo, intruisto en popollernejo kaj instruanto de Esperanto, kune kun sia edzino kaj gelernantoj 13-16 jaraj, tre volus korespondi kun gefrancoj.
Interesoj : vivo en fremdaj landoj, turismo, kolektado de diversaĵoj, kaj precipe : Esperanto.

*******************************************************************************

Résumé pour les nouveaux élèves de nos cours

Pour vous permettre dès à présent la pratique de l'Esperanto, de nombreuses rencontres sont prévues dès le mois d'Avril : notre congrès régional à Mulhouse le 30 Avril, une rencontre à la Hingrie près de Lièpvre (entre Sélestat et Ste Marie aux Mines) les 27 et 28 Mai.

D'autres excursions sont prévues, dont les dates ne sont pas encore fixées Le Haut Barr près de Saverne (avec marche de 4 heures), La Bresse, et région de Bains-les-Bains.

Si vous désirez recevoir des renseignements plus détaillés, adressez-vous aux responsables indiqués pour chaque rencontre ou au secrétaire de la Fédération. La plupart des excursions envisagées supposent un moyen de transport personnel, cependant une participation en train est parfois possible, les non-possesseurs de véhicules pourront éventuellement être mis en rapport avec des personnes pouvant les prendre en voiture. N'hésitez pas à vous annoncer, si vous êtes débutant en Esperanto vous pouvez nous écrire en français.

J.-P. C.

°°°

## " ALSACO, nia lando "

Adapto en Esperanto de la folklora kanto " Das Elsass unser Ländel, das isch meineidig scheen " (kantebla laù la originala melodio)

1) Alsaco, nia lando,
belega estas vi.
Resonu laùdo-kanto
laù nia tradici' -
juhee !
laù nia tradici' !

2) La montoj kun vitejoj
la kampoj en la val',
la urboj kaj vilaĝoj
ja estas sen egal' -
juhee !
ja estas sen egal'.

3) Ni, homoj el Alsaco,
ne timas pri kritik',
kaj frontas kun minaco
al ĉia malamik' -
juhee !
al ĉia malamik'.

4) Ni estas realistoj,
laù nia origin'.
kaj ankaù optimistoj
pro nia bona vin' -
juhee !
pro nia bona vin'.

5) Ni ne malŝatas brandon,
el pruno kaj ĉeriz',
kaj ĉian dolĉan frandon
de l'tera paradiz' -
juhee !
de l'tera paradiz'.

6) Alsaco, kara lando,
vi estas nia glor'.
Ni tenas per rubando
vin firme, en fervor'-
juhee !
vin firme, en fervor'.

A.L. (Mulhouse)

Dediĉe al "Kultura Esperanto-Centro Florival " fondita en januaro 1967, en 68 - GUEBWILLER (Franclando)

-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-*-

A T E N T U, Atentu bone !

Si une petite étoile se trouve dans le cadre ci-contre cela signifie que le trésorier de la Fédération, M.CHAPELLIER 109,Avenue de la Malgrange à 54-JARVILLE - C.C.P. 399-75 Nancy, n'a pas encore reçu votre cotisation 1967. - Il vous serait reconnaissant de bien vouloir la lui adresser sans retard (Sauf pour les membres de Strasbourg qui réglent à Mme J. OEHRI, 24,rue des Sarcelles 67-STRASBOURG C.C.P. 306-58 Strasbourg, en ajoutant 5 Fr pour le groupe de Strasbourg.

RAPPEL TRES RESUME DES DIFFERENTES COTISATIONS : Fr.

| | | |
|---|---|---|
| 1.-Membre étudiant ou Jeune (moins de 21 ans) indiquer la date de naissance..... | | 2,50 |
| 2.-Membre Adhérent de UFE et UEA (reçoit le Bulletin trimestriel d'information en françaìs)................................ | | 5.00 |
| 3.-Membre "Junior"(jusqu'à 21 ans) reçoit"Franca Esperantisto"................. | | 8.00 |
| 4.-Membre "titulaire" (reçoit "Franca Esperantisto") ........................ | | 20.00 |
| 5.-Membre individuel de UEA avec annuaire (MJ) | pour "Junior" ................. | 17.00 |
| | pour adultes .................. | 37.50 |
| 6.-Membre individuel de UEA avec revue (MA) | pour "Junior" ................. | 35.00 |
| | pour adultes .................. | 55.00 |

(pour plus de détails, voir bulletin précédent n°54)

A toutes ces cotisations, ajouter 1.00 Fr. pour l'abonnement à "La Informilo"(ce bulletin.

# K A S R A P O R T O

(Periodo de la 1-IV-1966 ĝis 31-III-1967)

**ENSPEZOJ** (Fr.)

| | | |
|---|---|---|
| Saldo je la 1-IV-1966 . . . . . . . . . . | | 402,53 |
| Kotizoj 1965(21 membroj) . . . . | 30.00 | |
| Kotizoj 1966(60 membroj) . . . . | 95.50 | |
| Abonoj al "La Informilo" . . . . | 55.50 | |
| Kotizoj rekte pagitaj al U.F.E. (parto de la Federacio) . | 3.00 | |
| Diversaj donacoj . . . . . . . . | 9.00 | |
| enspezo 1966 . . . . | 193.00 | 193,00 |
| Tuta enspezo . . . . . . . . | | 595,53 |

**ELSPEZOJ**

| | |
|---|---|
| Elspezoj de la federacia sekretario . . . . | 31,67 |
| Elspezoj de la federacia kasisto . . . . . | 10.25 |
| Sendkosto de la Informilo n°53 (103 ekz.). . . . | 11.70 |
| 25-a Federacia Kongreso en Sélestat . . . . . | 10.00 |
| Tuta elspezo . | 63,62 |

| | | |
|---|---|---|
| Enspezoj 1966-67 | : | 595.53 |
| Elspezoj 1966-67 | : | 63.62 |
| Bonhavo je la 1-IV-1967 | : | 531.91 |

Nancy, la 1-an de aprilo 1967
La Federacia Kasisto :

---

Serioza peto !

Doktoro A.WENCLEWSKI, malnova korespondanto de nia kasisto, J.Chapellier el Nancy, havas 16 jaraĝan filinon kiu lernas la francan lingvon; li serĉas samaĝan francan fraŭlinon kiu akceptus esti lia gastino dum venonta julio kaj interŝanĝe gastigus lian filinon dum aŭgusto. Fraŭlino WENCLEWSKA ŝatus trovi korespondantinon por franclingva korespondado.

Interesuloj, bonvolu skribi al :
D-ro Alois WENCLEWSKI - POZNAN - ul.Wojskowa 13.m.3. Pollando.
aŭ al :
S-ro CHAPELLIER Jean, 109,avenue de la Malgrange 54-JARVILLE, kiu mem rilatos kun D-ro Wenclewski.

---

INVITO.- G.E.E. invitas al la kunvenoj de I.L.E.I. (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) okazontaj en la kadro de la Eŭropa Esperanto-Kongreso (23-30/7/1967) en INNSBRUCK(Aŭstrio). Estos ebleco de tie flugi rekte al la Universala Kongreso en TEL AVIV (1-a de aŭgusto) kaj reen (9-a de aŭgusto).- Por ricevi unuan bultenon kaj aliĝilon, detalojn pri flugado oni sin turnu al : Aŭstria Esperantista Federacio - Eŭropa Esperanto-Kongreso
Fünfhausgasse, 16. - A - 1150 - WIEN (Aŭstrio)

Suplemento al la INFORMILO n°55

Aliĝilo al la 26-a Kongreso de la Orientfranca Esperanto-Federacio

resendota al S-ro Marcel Cuéné 26,rue Engel-Dollfus 68 - MULHOUSE

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Nomo ______________________________ Antaŭnomo ________________________

Kompleta adreso ______________________________________________________

______________________________________________________

Ĉu vi alvenos : (*) aŭtomobile ?
(*) trajne ? indiku la alvenhoron de via trajno______

Ĉu vi havos proponojn, sugestojn por la tagordo ? __________________

Ĉu vi estas kandidato por la komitato ?________________________________

-d°- por la estraro ? ________________________________

Se vi povos ĉeesti (*) jes - ne, ĉu vi deziras komune tagmanĝi ? _____

Se familianoj aŭ amikoj ankaŭ ĉeestos la komunan tagmanĝon,

kiom da personoj ? ___________

Posttagmeze : se malbela vetero, ĉu vi povus prezenti ion, en varia

programo ? ______________________________________________

Ĉu vi deziras trapasi la elementan ekzamenon ? _____________________

(*) Se vi ne povos ĉeesti : mi transdonos mian voĉon al______________(*)

mi transdonos mian voĉon al la asembleo (*)

________________, la de aprilo 1967

(subskribo)

(*) forstreku la netaŭgajn frazojn